Christian Morgenstern,

# [Schwacher Leib]

Schwacher Leib, du trägst nur aus,
was ich einst verschuldet habe,
sinkst, ein sacht zerfallend Haus,
nah und näher deinem Grabe,
drum soll kein Verdruß mir keimen,
daß so schwer in dir zu heimen.

Beide hatten wir zu büßen,
und so wurden wir ein Wesen,
haben uns auf Windesfüßen
Beide zum Bezitz erlesen.
Einer sah den andern,
und da war es schon ein Wandern.

Und da stand auch vor uns beiden
schon das Ziel: es soll voll Mühen
einer durch den andern leiden,
einer durch den andern blühen:
daß so beider Streit und Liebe
neue Lebensfrucht enttriebe.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31).*

*Arg-138-275 (2004-02-01 10:34:24)*

*Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in der internationalen Literaturzeitschrift "Fonto", Nr. 274 vom Oktober 2003, erschienen.*

Christian Morgenstern,

# [Febla korp']

*tradukita de Willy Nüesch*

Febla korp', vi nur eltenas,
kion mi kulpadis iam,
disfaleta dom', vi trenas
vin al tombo pli kaj pli jam,
mi ne volas do riproĉi,
ke tre pezas en vi loĝi.

Al ni du necesis pento,
tial ni nin unu plektis,
sur piedo de la vento
ni posedo nin elektis.
Unu vidis la alian,
kaj jen migris unu ni jam.

Kaj jam staris celo nia
antaŭ ni: suferi, plori
devos unu per l' alia,
unu per l' alia flori:
ke el niaj am' kaj lukto
ĝermu nova vivofrukto.

*Traduko de la Germana poemo "[Schwacher Leib]" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-138-276 (2013-08-28 18:45:43)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poemtradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*